

ESPERANTO

sub la suda kruco

junio 2023



Marcel Leereveld
1917-2023
paĝoj 19-24



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

**OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ**

Volumo 31[1] numero 150 junio 2023

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktisto: Terry Manley

Provlegantoj: Donald Rogers, Trevor Steele, Nicole Else

Kunordigisto: Jonathan Cooper

Kontaktadreso: esk@esperanto.org.au

AEA – ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

Abonoj kaj pasintaj numeroj

Esperanto sub la Suda Kruc estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: www.esperanto.org.au / info@esperanto.org.au

NZEa: www.esperanto.org.au / esperantonewzealand@gmail.com

Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruc

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk@esperanto.org.au

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn tradukojn (ekzemple per Google Translate).

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15a de aŭgusto 2023

La redaktistoj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2023 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380

SUR LA KOVRILO: *Marcel Leereveld* – Vidu paĝojn 19–23.

Pri aliaj fotoj, vidu paĝon 26.

ENHAVO

Antaŭparolo	04
Aŭtuna festivalo en Armidale	05
Pico por la pigra kuiranto	06
Mia nova ŝatokupo	08
La Varsovia Juda Ribelo post 80 jaroj	11
Vizito al suda Francio en vintro	13
Pri William Rupert (Bill) Aldridge	17
Marcel Leereveld, 1917–2023	19
Aliaj omaĝoj al Marcel Leereveld	22

En la lasta numero mi menciis la eblecon, ke la Aŭstralia Kongreso kaj Somerkursaro de januaro 2024 okazos en Ballarat, Viktorio. La estraro findecidis pri tio, kaj nun aranĝoj estas preskaŭ finitaj. Detalojn vi trovos en la retejo de AEA kaj en la broŝuro. Ne preterkonsideru partoprenadon en la evento por ĝui ĝin kaj por subteni la agadon de via asocio.

Multaj el la estraranoj, kaj aliaj membroj de AEA, ekzameniĝis ĉe la KER ekzamenoj en junio. Inter 2008 kaj 2022, estis 2650 esperantistoj, kiuj sukcesis en la ekzameno, sed nur ses kandidatoj estis el Aŭstralio: entute unu el 440. Sed por

2023 ni havas naŭ kandidatojn (unu devis rezigni, bedaŭrinde). Entute en la reta aliĝo estis ĉ. 80. Do, proksimume unu el dek estas aŭstraliano. El Nov-Zelando nur du ekzameniĝis en 2022, kaj neniuj antaŭe. Verŝajne la tuta nombro da kandidatoj pli altiĝos (estos KER ekzamenoj ĉe la UK en Torino), sed ja estas granda ŝanĝo en nia partoprenado.

Se vi interesiĝas, vizitu la retejon edukado.net kaj pripensu ekzameniĝon en 2024. Iru al edukado.net/ekzamenoj/ker. Estus plej bone alkitimiĝi pri la instrukcioj, kaj teknikaj kaj ekzamenaj, sur la retpaĝoj, antaŭ ol ekzameniĝi. 



Marcel Leereveld prelegas. Vidu paĝojn 19–24

Aŭtuna festivalo en Armidale

TERRY MANLEY (ARMIDALE)

Je la 1a de Aprilo 2023 okazis la plej granda festivalo de la jaro en Armidale, la Aŭtuna Festivalo. Armidale situas en regiono nomita Nova Anglujo, kiu estas iom alta (1000-1500 metrojn super la marnivelo). Tial la sezonoj estas distingeblaj kaj la aŭtunaj koloriĝoj kaj falo de folioj estas mirindaj.

Kiel en multaj lokoj en Aŭstralio, kiam la angloj alvenis antaŭ proksimume ducent jaroj, ili provis angligi la pejzaĝon per plantado de arboj el sia mondregiono. Do ili anstataŭigis la eŭkaliptojn, kazuarenojn, akaciojn per kverkoj, aceroj, salikoj ktp.

Por celebri tian buntkoloran sezonon de flavaj, ruĝaj, oranĝaj kaj brunaj folioj la armidalanoj dum la pasintaj tridek jaroj organizas festivalon, en kiu multaj partoprenas. La pinta evento estas la parado, kiu malrapide trairas la stratojn dum proksimume horo. Policanoj, skotaj muzikistoj, lernejoj, antikvaj aŭtomobiloj, diverskulturaj grupoj, universitataj studentoj, indiĝenaj reprezentantoj, kontraŭkriservantoj, kaj multaj lokaj volontulaj grupoj partoprenas en tiu parado.

Mi partoprenis en la festivalo antaŭ jaroj kun grupo kiu nomiĝas Sustainable Living Armidale (SLA). Tiu organizo rilatas al daŭrigebla evoluigo en cirkonstancoj, kiuj ebligas bonan vivon por estontaj generacioj. La agadoj de tiu grupo inkluzivas komunan ĝardenon, naturprotektadon, bicikladon, sunenergien ks. Ĉi-jare SLA, kun la helpo de artisto el Anglujo, konstruis grandan koalon por montri la minacojn kontraŭ tiu besteto. La koalo laŭiris la stratojn kiel parto de la parado.

Neil la artisto (kaj kuzo de SLAano) estas el Lewes en Anglujo. Lewes estas fama kiel la ĉefurbo de festofajroj en la mondo. Dum jarcentoj la urbo uzis fajrojn por memori la dek sep martirojn



Terry kaj Helen antaŭ la grandaj koaloj

bruligitajn en Lewes en la 16a jarcento kaj por memori pri Guy Fawkes, kiu planis eksplodigi la parlamentejon en 1605. En la fruaj jaroj la evento estigis tumulton kaj instancoj malpermesis ĝin dum jaroj. En la lasta jarcento la evento estis regula sed ankoraŭ iom anarkiisma. Neil estas parto de teamo kiu konstruas skulptaĵon por la festofajro ĉiun jaron. Li jam faris tion dek ses fojojn. La skulptaĵo ne estas solida sed el ligno kaj papero. Ofte la temo por la "vivanta bildo" estas politika.

Do en Armidale ni profitis de la instruado de Neil, kiu montris la procezojn por la konstruado de tiuj grandaj artaĵoj dum semajnoj. Kutime la artaĵoj de Neil kaj lia teamo estas bruligataj la saman tagon, kiam tiuj montriĝas antaŭ la publiko – je la fino de la parado. Ili havas mallongan kaj gloran vivon. Sed por la unua fojo en Armidale la skulptaĵo de Neil restis. Oni ne povus bruligi koalon post nia aŭtuna parado! **E**

Pico por la pigra kuiranto

JONATHAN COOPER (GOSFORD, NSK)

Dum multaj jaroj mi supozis, ke por havi bonan picon ĉeĥeĵme, oni devas aŭ aĉeti ĝin aŭ krei picobazon per gisto kaj havi realan piconfornon. Jes, mi sciis, ke mi povas uzi lebanan panon, sed la rezultoj ne vere kontentigis min. Ĝis mi eltrovis... la picoŝtonon! Oni povas aĉeti tion en la kuira sekcio de magazeno. Pli bone, aĉetu du, ĉar unu pico neniam sufiĉas.

Jen mia facila recepto por bongusta vegetara pico:



Vi bezonos:

- Pico-ŝtonon
- Pecon da lebana pano (Mi frostigas ilin por konservi ilin freŝaj ĝis bezonataj.)
- Saketon (~20 ml) da tomato-pasto (Vi povas uzi tomato-paston el bokalo aŭ ladskatolo, sed mi uzas saketon, ĉar unu estas la perfketa kvanto kaj mi malŝparas nenion. Ne uzu pico-saŭcon, ĉar ĝi igos la picon tro malseka/mola.)
- Mocarelon, raspitan (Mi aĉetas tion jam raspitan, en sako, kaj frostigas ĝin ĝis ĝi estas bezonata.)
- Ruĝan kapsikon, grandajn fungojn kaj nigrajn olivojn (aŭ aliajn kompletaĵojn laŭ via plezuro)
- Paprikon
- Erukon (nedevice)

Metodo:

1. Metu la picoŝtonon en la fornon kaj varmigu ĝin ĝis 225°C.
2. Malfrostigu la lebanan panon se ĝi estas frostigita (en mia mikroonda forno mi elektas la pezon "55 gramoj") kaj metu ĝin sur teleron.
3. Ŝmiru ĝin per tomato-pasto.
4. Disŝprucu la mocarelon sur tion. (Ne necesas malfrostigi ĝin.)
5. Tranĉu la kapsikon kaj fungojn en maldikajn striojn kaj aranĝu ilin (mi ŝatas spokforme) sur la mocarelo.
6. Surmetu kaj aranĝu la olivojn.
7. Disŝprucu iom da papriko. (Tio helpas la fromaĝon bruniĝi.)
8. Metu la picon sur la picoŝtonon. (Glitigu ĝin, pli-malpli rapide sed zorge, de sur la telero per spatelo.)
9. Rostu ĝin ĝis la mocarelo ekbruniĝas.
10. Forprenu la picoŝtonon kaj picon el la forno kaj metu ilin sur varmrezistan lokon, kiel lignan tranĉtabulon.
11. Surmetu kaj aranĝu la erukon sur la pico se vi deziras.
12. Tranĉu la picon en 6 pecojn. (Picrado helpas, ke la kompletaĵoj restu enloke.)
13. Portu la picon (kun picoŝtono) al la tablo sur la tranĉtabulo, por teni ĝin varma. 🍴



Mia nova ŝatokupo

NICOLE ELSE (SIDNEJO)

Kiam mi estis juna kaj ankoraŭ vivis kun miaj gepatroj, ofte estis puzlo sur la tablo. Mia patrino kaj mi ja ŝatis kunmeti puzlojn kaj do ni faris tion de tempo al tempo. Poste mi konsideris, ke mi ne havas sufiĉe da tempo por puzloj.

Pasintjare YouTube hazarde sugestis, ke mi spektu filmeton pri la monda puzla konkurso, kiu okazis en Hispanio. Mi ne sciis, ke ekzistas konkursoj por kunmeti puzlojn kiel eble plej rapide. Mi mem foje pensis organizi tian konkurson, sed ne estus tiom facile organizi tian eventon, do mi rezignis. Kaj nun mi eksciis, ke tiaj eventoj vere ekzistas. Spektinte la konkurson, mi tuj volis preni puzlon kaj mezuri la tempon, kiun mi bezonas. Kaj tiel komenciĝis mia rea interesiĝo pri puzloj.

Puzloj por plenkreskuloj ja fariĝis popularaj dum la hejmmrestado pro Kovimo. Puzli estas tre bona maniero malstreĉiĝi. Dum mi rigardas la pecetojn, mi forgesas pri ĉiuj mondaj problemoj. Oni eĉ diras, ke puzloj povas helpi prokrasti la alvenon de la malsano Alzheimer.

Post la spektado de la filmeto pri Hispanio, mi scivolis, kio okazas en Aŭstralio. En Facebook ja estas grupoj por puzlo-amantoj. Ekzistas Aŭstralia puzla asocio. Ekzistas jutubkanaloj nur pri puzloj. Usonanino, kiu parolas nur pri puzloj en sia kanalo, eĉ havas mencion en la "Guinness World Record Book" pro siaj multaj spektantoj.

Do ĉu ekzistas konkursoj en Aŭstralio? Jes. La tutlanda konkurso okazis en Melburno pasintjare. Kaj en februaro



La NSK puzlo-konkurso (februaro 2023). La verda cirklo montras kie Nicole estis.



La speciala puzlo de Esperanto NSW

Ĉi-jare okazis la NSK-a ŝtata konkurso en Sidnejo. Mi decidis partopreni. Okazis du eventoj, unu por teamoj de 2 personoj kaj unu por individuoj. Mi partoprenis tiun por individuoj. Ni devis kunmeti 500-pecan puzlon kiel eble plej rapide. La maksimuma tempo por tion fari estis 3 horoj. 160 personoj partoprenis. La venkinto bezonis nur 45 minutojn, nekredible rapide. Mi kontentis, ke mi sukcesis fari tion en malpli ol 2 horoj. Estis granda diferenco inter la tempo bezonata. Mia estis mezbona. 21 personoj ne sukcesis fari la taskon ene de 3 horoj. La lasta havis ankoraŭ pli ol 300 pecojn post 3 horoj, do li eĉ ne faris duonon de la puzlo.

Ĉi-jare la monda konkurso ree okazos

en Hispanio. Almenaŭ du aŭstralianoj partoprenos. Ankaŭ virino el Novzelando, kiu havas puzlo-kanalon, flugos al Hispanio speciale por tiu konkurso. Pasintjare pli ol 600 personoj partoprenis.

Je la fino de la pasinta jaro mi ree pensis pri mia revo mem organizi puzlo-konkurson, kaj mi proponis organizi tian eventon por nia Zamenhof-festo en Sidnejo. Mia propono estis akceptita kaj la federacio eĉ decidis mendi specialajn puzlojn kun Esperanto-temo. Mi elektis montri Esperanto-poŝtmarkojn sur la bildo. La puzloj havas 200 pecojn, kio estas bona nombro por personoj, kiuj ne kutimas puzli. Mi pensis, ke eblus kunmeti la puzlojn ene de 30 minutoj ĝis unu horo kaj efektive iuj sukcesis, tamen ne ĉiuj!

Mi pensas, ke eĉ tiuj, kiuj ne sukcesis fari tion rapide, tamen ĝuis la sperton.

Nun ekzistas tiom da diversaj puzzleoj, multaj kun belegaj bildoj pri arto, belaj pejzaĝoj, bestoj, ktp. Certe vi povos trovi bildojn, kiuj tre plaĉas al vi. Do ĉu vi nun kuros al magazeno por aĉeti unu? Mi

konsilas aĉeti unu kun 500 pecoj, sed poste vi povos aĉeti pli grandajn. La puzzleo kun plej multaj pecoj nun aĉetebla havas 60 000 pecojn. La virino el Nov-Zelando montras sur sia kanalo kiel ŝi kunmetis puzzleon kun 54 000 pecoj. Ŝi bezonis nur 347 horojn! 🧩



La puzzleo-konkurso en Esperanto-Domo, en decembro 2022



Je la okdeka datreveno de la Varsovia Juda Ribelo

TERRY MANLEY (ARMIDALE)

Mi kaj mia edzino kutimas legi libron dum la lavado de la teleroj. Iu lavas kaj la alia voĉlegas. Lastatempe la elektita libro estis *The Warsaw Orphan* (La Varsovia Orfino) de Kelly Rimmer. Kelly estas nuntempa populara aŭtoro, kiu loĝas ie meze de NSK, mia ŝtato. Tio fakte surprizas min, ĉar dum la legado mi kredis, ke ŝi verŝajne estas usonano. La libro parte baziĝas sur la vivo de Irina Sendler, pola flegistino kaj sociala laboristo, kiu helpis pri la saviĝo de ĉ. 2500 judaj infanoj, el varsovia geto dum la dua mondmilito. Por la historia fono de la romano, Kelly ankaŭ studis iom el la kolektaĵo de la historiisto Emmanuel Ringelblum. En Varsovio, Emmanuel

kolektis afiŝojn, dekretojn, oficialajn dokumentojn, taglibrojn, fotojn, porcio-kuponojn, ks, dum la dua mondmilito. Entute pli ol 25,000 paĝojn. Ringelblum kaŝis la kolekton antaŭ ol la juda geto estis tute detruita.

La romano trairas la jarojn 1942-1946 kaj koncentriĝas pri du familioj. Unu juda familio en la ĉirkaŭmurigita juda kvartalo (geto), kaj pola familio ekster la muro, sed proksima al ĝi. La kondiĉaĉoj en kiuj la familioj vivis estas bone priskribitaj. La germanoj, dum tiuj jaroj, transportis cent milojn da judoj el la geto al *Vernichtungslager* (ekstermejo) ĉe Treblinka. Krome, kelkdek miloj da judoj mortis en la geto pro malsato aŭ pro



mortigado fare de la germanoj.

Komence la judoj ne sciis aŭ ne deziris kredi, ke iliaj samgentanoj fortransportitaj estos mortigitaj. Ili preferis kredi, ke la vagonaro de la *Umschlagplatz* (transirigejo) kondukus al pli bonaj vivkondiĉoj, kie ili laborus por la germana militmaŝino. Sed ili esperis vane. Iuj junaj judoj eksciis pri la granda trompo kaj, pro la aĉega traktado en la geto kaj mortigado, ribelis kontraŭ la germanoj. (Mi skribas ĉi tiun artikolon je la 80-jara datreveno de la ribelo de la judoj en la varsovia geto. Ĝi okazis je la 18a de aprilo 1943.)

Unu de la stratoj en la romano estis Zamenhofa strato, kaj tio instigis min restudi la tragedian sorton de la zamenhofa familio dum tiu periodo. En la fina ĉapitro de la libro *Zamenhof*, verkita de Marjorie Boulton, estas priskribo pri tio. En 1939 Adamo, filo de L.L. Zamenhof, daŭre loĝis en 41 Króleska strato, Varsovio, kie li kuracis klientaron. Iuj el tiuj, estis el la klientaro de lia patro. Adamo estis inter la unuaj oftamalogoj en Eŭropo, kaj iĝis ĉefo de tiu fako en varsovia hospitalo. Lia edzino, Wanda, ankaŭ okulisto, helpis lin. Kun sia filo, Ludoviko, ili loĝis en Króleska strato. Ankaŭ la fratinoj de Adamo, Sofia kaj Lidia, kunloĝis kun lia familio. Sofia estis kuracistino kaj Lidia, kun diplomo pri juro, ĵus revenis de longa vojaĝo en Usono.

Do ĉiuj el la gefiloj kaj la nepo de L.L. Zamenhof estas en Varsovio komence de la milito. La familia domo estis bombita kaj tute detruita per fajro en septembro 1939. Adamo laboris en la hospitalo kaj liaj familianoj fuĝis el la flamanta domo. Ne longe poste la Gestapo arestis Adamon, lian edzinon kaj liajn fratinojn. La nazioj pafmortigis Adamon, oni kredas, je la 29a de januaro 1940. Sofia kaj Lidia liberiĝis el malliberejo *Pawiak* en marto 1940. En 1941 ĉiuj judoj estis pelitaj en la ĉirkaŭmurigitajn getojn.

“Inter tiuj 400,000, tiel kondamnitaj al malsato, malpureco kaj deviga perdo de homa digno, troviĝis Sofia, Lidia, Wanda kaj la juna Ludoviko.

“En aŭgusto 1942, Sofia, Wanda, Ludoviko estis denove arestitaj, kaj kondukitaj el la geto al la *Umschlagplatz* por envagoniĝi kaj vojaĝi al Treblinka. Survoje al tiu vagonaro, Wanda sukcesis forŝteliri kun la filo kaj kaŝi sin... Sed senkulpa, aminda Sofia, kiu kredis, ke tiu vagonaro portos la judojn nur al orientaj provincoj, diris, ke, kiel kuracistino, ŝi povos helpi aliajn; kaj senproteste ŝi iris al Treblinka.”

Plurfoje en la romano, Kelly Rimmer rakontas pri okazoj, kie judoj estas forkondukataj al *Umschlagplatz*. Verŝajne, en unu el tiuj fruaj kazoj ŝi rakontas pri la vagonaro, kiu verŝajne forportis familianojn de Zamenhof. **E**



Vizito al suda Francio en vintro

DAVID RYAN (WELLINGTON, N-Z)

En januaro 2023 mia edzino kaj mi pasigis iom pli ol unu semajno en suda Francio (en Provenco kaj apudaj regionoj).

Oni scias ke suda Francio estas paradizo dum somero kaj milionoj da homoj vizitas la tiean marbordon por ferii, naĝi en la maro, trinki vinon dum sunplena tago, kaj ĝui la faman sudfrancan kuirarton. En vintro, ne samas...

Tamen, vizito al suda Francio dum vintro havas kelkajn avantaĝojn. Ekzemple, ne estis tiom da turistoj, ni facile trovis sidlokojn en trajnoj, ni neniam devis atendi en vico, kaj ni trovis hotelĉambrojn je ne tre alta prezo. Male, suda Francio dum vintraj monatoj estas iomete fermita.

Ni vizitis Avignon kiu famas pro la (mez)ponto kaj la Papa Palaco. Je la komenco de la 14-a jarcento la tiama Papo, pro ĥaoso en Romo, decidis translokiĝi al Avignon, al granda gotika konstruaĵo. Papoj loĝis tie dum preskaŭ 100 jaroj. La Palaco nun estas turisma loko kaj ejo por ekspozicioj kaj kongresoj.

Poste, ni pasigis dimanĉon en Montpellier, sufiĉe grandan urbon kun loĝantaro de 300 000. Ni ĉeestis diservon en

katedralo kaj, je eliro, proksimume 10 soldatoj staris ekster la katedralo – kun maŝinpafiloj! Mi ne kuraĝis demandi kial, sed ŝajnis, ke ili estas tie por protekti homojn en la katedralo. Ĉu ni nun loĝas en tiel danĝera mondo? Post vizito al la katedralo, ni vizitis bazaron, kie oni vendis brokantaĵojn, librojn ktp. Poste... do, neniuj butikoj estis malfermita. Feliĉe ni trovis etan restoracion, sed ŝajnis ke dimanĉe



Papa Palaco en Avignon

Montpellier estas preskaŭ tute fermita.

Post Montpellier, ni vizitis Carcassonne apud la landlimo kun Hispanio. Carcassonne estas eta urbo kun proksimume 50 000 enloĝantoj. Tamen, ĝi famas pro la fakto, ke tie troviĝas granda citadelo (kastelo) sur monteto. Ni promenis sur la muroj kaj faris multajn fotojn. Tiu loko certe vizitindas. Kiel en Montpellier, ŝajnas ke Carcassonne estas fermita lunde. Kiam ni forlasis la urbon la sekvan tagon (mardon), multaj butikoj malfermiĝis, sed ne lunde. En kelkaj butikaj fenestroj ni legis indikilojn, ke la butikoj ne remalfermiĝos ĝis post la vintro, ekzemple en marto.

En Carcassonne ni aŭdis homojn kiuj parolas en la kataluna – verŝajne temis pri turistoj el Barcelono aŭ Andoro. Ni vidis ankaŭ kelkajn turismajn indikilojn en la kataluna. Pri lingvoj, estis strange ke en Francio kaj en norda Italio, kie ni ankaŭ turismis, oni uzas la anglan vorton “ticket”

(bileto) por diri kvitancon. En butikoj oni demandis “Ĉu vi volas ‘ticket’”? Por ni, “ticket” ne havas signifon de kvitanco.

Ni vizitis Marseille, la duan plej grandan urbon en Francio. Mi ne havis grandan deziron por viziti Marseille, ĉar ni aŭdis nur ke Marseille estas malpura, danĝera urbo. Tamen, de tie komenciĝis nia flugo por reiri al Nov-Zelando kaj, pro tio, ni devis pasigi unu nokton en Marseille.

Mi devas konfesi grandan surprizon. Marseille ege plaĉis al mi! Ĝi estas multkultura urbo (kun afrika kaj araba influoj) kun vizitindaj kasteloj, katedraloj ktp. Ni iris en aŭtobusa ekskurso laŭ la marbordo kaj ĉio aspektis tre bela kaj ĉarma. Ni volis viziti la insulon If, de kie sukcesis fuĝi la grafo de Montekristo laŭ la romano de Alexandre Dumas. Malfeliĉe, tio ne eblis, ĉar la marakvo estis tro danĝera por malgranda turisma boato. Mi certe revizitos Marseille. Estas multaj vidindaĵoj.

Daŭras sur paĝo 16 >



(Mez)ponto de Avignon



*Citadelo de
Carcassonne
(nokte kaj tage)*



Resume, suda Francio estas tre interesa regiono kun multaj historiaj vidindaĵoj. Certe oni devas ankaŭ profiti viziton por ĝui lokan vinon kaj bongustajn manĝaĵojn. 



Vido de Marseille kaj Mediteraneo de Notre Dame de la Garde




Haveno de Marseille

Memoroj pri William Rupert (Bill) Aldridge

DONALD ROGERS (WELLINGTON, N-Z)

Mi unue renkontis Vilĉjon en 1973, antaŭ preskaŭ kvindek jaroj en Wainui-omata (urbo apud Wellington). Tamen li estis naskiĝinta en Hamilton je 24-a julio 1946 kaj edukigis tie kaj en la universitato de Auckland. Lin multe interesis lingvoj, kaj li instruis la germanan en mezlernejo. Li havis universitatan diplomon, en kiu la germana estis la ĉefa fako. Kiam mi renkontis lin, li estis laboranta kiel tradukisto por la Traduka Servo de la ministerio pri enlandaj aferoj. Du jarojn poste



li iĝis la ĉefo de la Traduka Servo. Li lernis Esperanton en la fruaj sepdekaj jaroj. Lia praavo George Aldridge estis la unua prezidanto de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio en la 1900-aj jaroj. Tio ŝajne inspiris Vilĉjon lerni Esperanton. Li fojfoje uzis kontaktojn kun alilandaj esperantistoj por akiri informon por tradukoj pri diversaj temoj. Post jaroj li kreis la propran kompanion por provizi tradukaĵojn al kompanioj.

En 1978 Vilĉjo enkondukis min al Esperanto en du sesioj, klarigante la bazajn faktojn pri la gramatiko. Tiujare mia edzino kaj mi, kaj niaj du infanoj, iris al Melburno kie mi studis ĉe universitato Monash dum tri jaroj kaj duono. Dum tiu tempo mi korespondis kun Vilĉjo per helikpoŝto. Mi enplektiĝis en la aŭstralia esperanta movado, aliĝis al la grupo en Mount Waverley kaj partoprenis la kongreson en Sidnejo en 1980. Ni reiris al Lower Hutt en 1981 kaj tiam renkontis,

por la unua fojo, la duan edzinon de Vilĉjo, Jill.

Vilĉjo estis aktiva en la Esperanto-Rondo de Wellington, kaj estris ĝin de 1989 ĝis 2021. Mi aliĝis al la grupo en 1982. En unu el la unuaj kunvenoj, kiujn mi partoprenis, Vilĉjo paroladis al la ĉeestantoj pri sia laboro ĉe la Traduka Servo. Li parolis pri la valoro de precizaj tradukaĵoj en komerco kun aliaj landoj, kaj la fuŝoj, kiujn faras nesufiĉe spertaj tradukantoj de reklamoj. Li tre impresis la ĉeestantojn.

En 1985, la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio decidis prezenti proponon al la Nov-Zelanda registaro. Vilĉjo verkis la proponon kun la titolo "Esperanto in Peace Education" (Esperanto en pasedukado), kaj li, profesoro John Adcock kaj mi (tiam prezidanto de NZEA) iris al la parlamentejo por prezenti la proponon al ministro Richard Prebble kaj diskutis ĝin kun li. La registaro ne agis laŭ nia propono. En 1986 NZEA elektis Vilĉjon Fratulo de NZEA pro lia sperto kaj kompetento pri Esperanto.

Dum la jaroj Vilĉjo helpis min pri diversaj projektoj, ĉefe provlegante artikolojn, kiujn mi verkis por ESK, Aŭstraliaj Esperantistoj, Monato kaj Vikipedio. Pro tio ke mi estis sciencisto, Vilĉjo fojfoje telefonis al mi por peti mian opinion pri la interpretado de sciencaj aŭ teknologiaj aferoj tradukataj de li por kliento de lia kompanio. Tio estis fruktodona kunlaborado.

Vilĉjo kaj mi havis komunajn interesojn pri komputiloj, lingvoj, kaj muziko. Dum multaj jaroj li ludis la orgenon por diservoj, geedziĝoj kaj funebroj. Iun vesperon li paroladis al la Rondo pri la ludado la fajfilorgenon. Ni iris al preĝejo en Wellington, kiu havis fajfilorgenon, kie li klarigis, en Esperanto, pri la funkciado de

la orgeno kaj li ludis kelkajn muzikaĵojn por ni.

Iun tagon, eble en la 1990-aj jaroj, Vilĉjo telefonis al mi. Li estis leginta pri velado kaj volis provi. Tio tre surprizis min, ĉar li ne multe interesiĝis pri sporto. Tamen li invitis min iri kun li kaj ni iris al Days Bay, luis malgrandan katamaranon kaj lernis veli en ĝi. Ni iom malsekiĝis, sed ni certe sukcesis irigi ĝin dum iom da tempo. Kaj tio estis ĉio. Neniam ripetota!

En 2014 Vilĉjo aĉetis elektran aŭton, fruan modelon de *Nissan Leaf*. Ni ofte diskutis pri la favoraj kaj malfavoraj faktoroj pri diversaj elektraĵveturiloj kaj baterioj. Li estis frua adoptanto de komputiloj, kaj li favoris tiujn de Apple. Li eĉ konstruis novan komputilon el komponantoj, kiujn li aĉetis per la Interreto, komputilon de tipo kiun oni nomas "Hakintoŝo", ĝenerala komputilo kun makintoŝa mastruma sistemo. Ĝi bone funkciis.

En 2015 Vilĉjo, Jill kaj ni partoprenis kvar tagojn de vapor-lokomotiva rondiro de Sudinsulo. Ĝin organizis *Steam Incorporated*, grupo kiu restaŭras malnovajn trajnojn. Ĝi estis sufiĉe malstreĉa vojaĝo. Unu el la kulminoj de la vojaĝo estis renkonti la vaste konatan, en Nov-Zelando, urbestron de Invercargill, Tim Shadbolt, kiu tre fervore bonvenigis la vojaĝantojn ĉe la stacidomo tie.

Ni kvar ankaŭ ĉeestis koncertojn de *Orchestra Wellington* ĝis la pandemio. Ni ankaŭ ĝuis kune manĝi ĉe nia aŭ ĉe ilia domo.

Li mortis je 14-a januaro 2023 post longa luktado kontraŭ kancero. Mi sentas la mankon de konversacioj kun Bill pri Esperanto, aliaj lingvoj, la konservado de energio, komputiloj kaj muziko. 

Marcel Leereveld, 1917–2023

HEATHER HELDZINGEN (MELBURNO)

Marcelo ĉiam estis inspiranto.


Mi renkontis Marcelon kaj Alida-n en 1964, kiam mi komencis lerni Esperanton ĉe la Melburna Esperanto klubo en Richmond. Miaj unuaj lecionoj estis kun Alida. Post la lecionoj ĉiuj eniris grandan ĉambron kie Marcelo gvidis konversacian lecionon. Mi ne kuraĝis paroli al li dum multaj monatoj, ĉar li aspektis grava kaj mia lingva scio estis ankoraŭ baznivela.

Post mia edziniĝo al Ivan, ni forlasis la Melburnan E-klubon kaj komencis E-klubon en Boronia. Sed ni ofte renkontis Marcelon ĉe la bazaro apud la haveno en St Kilda, kie li vendis la ceramikaĵojn de Alida. Kiam ni revenis al la Melburna

E-klubo en 2003, ni ĝuegis, ke Marcelo kaj Alida ankoraŭ aktivas, kaj Marcelo daŭre instruis, klopodante plibonigi nian komprenon kaj uzadon de Esperanto.

Marcelo naskiĝis en la jaro de la morto de Zamenhof, 1917, en Amsterdamo. Liaj gepatroj estis opero-amantoj kaj nomis lin honore al la artisto en La Boheme. Marcelo estis aktiva esperantisto ekde 1933, kiam lia avo kuraĝigis sian familion lerni Esperanton pere de kurso de la katolika radiostacio.

En 1934 li iĝis ano de la Nederlanda Laborista E-asocio. Estis 18 E-klubo en Amsterdamo tiutempe. En 1935 li biciklis al Parizo por ĉeesti E-kongreson de



Esperanto-kongreso Redfern, 5 Januaro 1962



en Aŭstralio, ofte prenante la rolon de prezidanto aŭ vicprezidanto en niaj asocioj, organizante kongresojn, instruante Esperanton, verkante ekzamenojn kaj sian gramatikan libron kun pli ol 300 paĝoj, Lingvaj Resondoj, nun haveblan elektronike danke al Stuart Kirkman, kaj konsideratan monde kiel altkvalitan gramatikan libron kaj gravan postlasaĵon de la laboro de Marcel.

Aktiva ĝis sia morto, Marcelo skribis artikolojn ĉiun semajnon por Aŭstraliaj Esperantistoj, estis teamano de la Esperanta radioprogramo ĉe 3ZZZ ĝis la mezo de 2022, kaj ĉeestis klubkunvenojn ĝis la fino de 2022. Lia entuziasmo por Esperanto estis senlima. Li estis inspiro por ĉiuj, kiuj havis la privilegion koni lin. Du semajnojn antaŭ lia morto li afable donis al mi lecionon pri intaj participoj!

Vi vivis tro mallonge, Marcelo. La Esperanto movado ankoraŭ bezonas vin. Vi estas unu el malmultaj, kiuj vere komprenis kiel nia lingvo funkcias. Vi sukcese trovis la ĝustan vojon. Vi ne nur sekvis la lingvospiriton de Zamenhof, sed ankaŭ lian homaranecon – kiu eble pli valoras en ĉi tiu afliktata epoko.



socialistoj. Dum kvin monatoj li trabiciklis Francion, loĝante ĉe esperantistoj kaj parolante ĉe E-klubo kaj kongresoj. Li eĉ renkontis Lydia, la filinon de D-ro Zamenhof.


En 1952 Marcelo kun sia edzino, Alida, kaj iliaj du infanoj, Roberto kaj Laura, enmigris Aŭstralion, pro la invito kaj subteno de la Melburna E-asocio. Post kelkaj monatoj da manlaboro, li ricevis postenon ĉe kolegio en Geelong por instrui la francan lingvon. Poste li translokiĝis al Hobarto, kie li instruis lingvojn, inkluzive Esperanton, ĉe kvakera lernejo dum kvin jaroj. Li reiris al Melburno post propono de laboro kiel lingva ĉefinstruisto ĉe gimnazio en Caulfield. Tie li instruis la germanan, francan, italan, pragrekan, hispanan kaj indonezian. Li restis tie ĝis sia emeritiĝo en 1982.

Marcelo kaj Alida vojaĝis tra la mondo dum la ferioj lernejaj, ofte vizitante esperantistojn kaj E-klubojn. Multajn landojn ili vizitis du- aŭ trifoje, inkluzive Indonezion, kiun ili vizitis dek fojojn.

Marcelo multe aktivis en Esperantujo

Marcelo senlace laboris en sia bela ĝardeno, eĉ grimpante arbojn por pritondi ilin antaŭ nemultaj jaroj. Li eĉ famiĝis en Usono, ĉar li kontraŭis la establon de vendejo de McDonalds en apuda urbeto.

Por mi persone, Marcelo estis grava amiko, afabla kaj malavara kun spico de humuro. Li ĉiam havis ion interesan por diri – ofte provokan. Lia amo al sia familio, opero, Esperanto kaj ĝardeno estis inspiro, ke li pluvivu. Niaj vizitoj al operoj kaj koncertoj dum multaj jaroj estis elstaraj jareventoj por mi. Mi ĉiam memoras lian grandan inteligentecon, bonkorecon kaj fortan karakteron. Estis privilegio, ke mi renkontis lin. **E**



Aliaj omaĝoj al Marcel Leereveld

Kia malfeliĉa novaĵo!

Mi renkontis Marcelon ĉe somerkurso en Melburno, antaŭ multaj jaroj! Mi vere ŝatis lian kurson kaj la profundajn gramatikajn diskutojn, kiuj okazis tie. Mi loĝis en Melburno kaj Adelajdo dum kelkaj jaroj, kaj ju pli da tempo mi konatiĝis kun Marcelo, des pli mi admiris lian klarecon, fortan karakteron kaj dediĉon al Esperanto. Iufoje mi malkonsentis kun li pri gramatikaĵo kaj la sekvan tagon li iris, ke li ne bone dormis pro pensado pri la afero. Tia estis lia deziro malkovri la veron kaj klarigi ĝin al aliaj. Mi sendas miajn elkorajn kondolencojn al la familio de Marcelo kaj al ĉiuj, kiuj konis lin. Li lasas vakuegon en Esperantujo.

Deborah McCarney

Marcelo kaj mi estis tre bonaj amikoj. Vere bonegaj amikoj. Ni ambaŭ estas esperantistoj, sed li estas multe pli bona esperantisto ol mi. Jes, mi opinias ke li estas ankoraŭ esperantisto. Li jam eniris tiun saman regnon, kiun mi esperas eniri. Tie mi renkontos Marcelon refoje, kaj espereble ankaŭ Ludovikon Lazaron Zamenhof, kiu espereble instruas sian belan kaj universalan lingvon tie al ĉiuj, kiuj deziras internacian pacon!

Mi deziras danki Marcelon pro liaj inteligenteco kaj senĉesa volo instrui nin. Mi apenaŭ dirus: "Vivu longe Marcelo!", Sed kial mi diras tion? Ni ĉiuj vivas ĉiame! Mi deziras al Marcelo ĉion bonan en lia vera hejmo. Pretiĝu, baldaŭ vi vidos min refoje en tiu sama hejmo.

Bob Felby



De maldekstre: Marcel Leereveld, Indu Devi Thapaliya, Kieu, Heather Heldzingen, Bob Felby, Esther Parrish



Roger Springer kaj Marcel

Se la teksto publikigita en la plej lasta elsendo de la novaĵletero de Roger estas el la mano de Marcelo en liaj lastaj tagoj, tio estas elstara ekzemplo de mensa klareco en viro tiom aĝa. Mi konas kelkajn centjarulojn, kaj por konversacii kun ili estas apenaŭ eble. Sed Marcelo estis ĉiam kapabla esprimi sin klare kaj lingve ĝuste. Mi ne dubas, ke lia daŭra agado en Esperantujo helpis lin resti mense vigla.

Marcelo! Vi estis unika.

Trevor Steele

Mi tre bedaŭras la forpason de Marcelo. Mi tre feliĉas ke mi havis la ŝancon renkonti lin. Li estis tre grava persono por mi, ne kiel la plej aĝa esperantisto, sed kiel simpla, tre saĝa kaj afabla homo. Lia forpaso estas granda perdo, ne nur por la aŭstraliaj esperantistoj, sed ankaŭ por la tuta Esperantujo. Por honori la memoron de Marcelo, mi decidis aliĝi

al la UK en Torino. Tie ni povos memori lin per simbola ceremonio.

Pavel Sikorski el Polando

Unu kialo por la sukceso de *Aŭstraliaj Esperantistoj* estas la regulaj artikoloj, kiujn Marcelo sendis al mi. Marcelo estas la tialo ke *AE* estas konata tra la mondo. Mi tre dankemas al li.

Roger Springer, redaktoro de *Aŭstraliaj Esperantistoj*

Unu el la malmultaj funkciantaj cerboj en Esperantujo!

Renato Corsetti
(iama prezidanto de UEA)





Marcel kaj Peter Johns

KONTRIBUU

al



ESPERANTO

sub la suda kruco



Ballarat, Viktorio, urbo de la Aŭstralia Esperanto-kongreso 2024

Australia Kongreso de Esperanto kaj Somerkursaro 2024

Okazos inter la 5a kaj 14a de januaro 2024,
ĉe Federation University, Mt Helen, Ballarat, Viktorio.

Pli da informo: esperanto.org.au/kongreso

Agnoskoj pri fotoj

4 Peter Johns

5 ?? Manley

6, 7 Jonathan Cooper

8 Australian Jigsaw Puzzle Association

9, 10 (malsupre) Jonathan Cooper

10 (supre) Nicole Else

11 Nekonata, eble Franz Konrad.
CC-BY-SA 3.0, Wikimedia Commons:
[commons.wikimedia.org/w/index.
php?curid=17223940](https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=17223940)

12 Bundesarchiv. CC-BY-SA 3.0.
Wikimedia Commons: [commons.
wikimedia.org/w/index.php?curid=5419787](https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=5419787)

13-15 David Ryan

16 Jonathan Cooper

17 Lucy Aldridge

19 Alec Iverson, State Library of NSW:
SLNSW_FL18887753

20-23 Peter kaj Jo Johns

24 Jo Johns

26 Denis Frolov. CC BY-SA 4.0,
Wikimedia Commons: [commons.
wikimedia.org/w/index.php?curid=73088346](https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=73088346)

28 Ilia Dewi (el Indonezio) kaj Teofilo
Jose Maria de Jesus (el Orienta Timoro),
ĉe St Kilda dum la aŭstralia kongreso,
Melburno, 2015. Foto: Joanne Johns

Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
(07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Joanne Johns | **Secretary**

Committee Members:

Terry Manley, Esther Parris

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Bradley McDonald | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

Committee Members:

Erin McGifford, Josuo Moss, Stephen Epstein

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@
gmail.com
0800 350 781

What is this?

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it's actually Esperanto.

What is Esperanto?

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn't have to speak Finnish and they wouldn't have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It's spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed to be easy to learn. It's completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There's an Esperanto version of Wikipedia, which has over 300 000 articles (more than the Hebrew version, for example).

Isn't English enough?

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

